
# 90-a Universala Kongreso de Esperanto

Vilno, 23-30 julio 2005

# DUA BULTENO



<u>Kongresa Temo</u>

## Universalaj Kongresoj:
## 100 jaroj de interkultura komunikado

# Enhavo


Loka Kongresa Komitato ........ interna frontkovrilo
Por eniri la landon ........ 2
Utilaj informoj pri Litovio kaj Vilno ........ 3
Loĝado en Vilno ........ 4
  Hoteloj kaj aliaj loĝebloj ........ 5
Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj ........ 11
  Vizitotaj urboj kaj vidaĵoj ........ 12
  Antaŭkongresaj ekskursoj ........ 14
  Postkongresaj ekskursoj ........ 16
Dumkongresaj ekskursoj ........ 19
  Tuttagaj ekskursoj ........ 20
  Duontagaj ekskursoj ........ 23
  Semajna skemo de ekskursoj ........ 25
Bankedo ........ 26
Provizora programo ........ 27
Programeroj dum UK ........ 27
Kiu kongresos kiam kaj kie? ........ 29
Ĝeneralaj informoj ........ 30
Kontaktinformoj ........ 32
Kongresaj perantoj ........ interna dorskovrilo


## Loka Kongresa Komitato

Povilas Jegorovas · prezidanto
Stasys Kružinauskas · vicprezidanto
Aloyzas Gudavičius · rektoro de IKU
Irena Alijošiūtė · sekretario
Aida Čižikaitė · kultura programo
Dalia Pileckienė · loĝigo
Vilma Tamašauskienė · antaŭkongreso, postkongreso, ekskursoj
Nijolė Stakėnienė · infana kongreseto
Choe Taesok (Choi Dae Suk) · kongresa kuriero, UK-hejmpaĝkunordiganto
Petras Čeliauskas · kongresa kuriero
Gražina Opulskienė · instruado
Audrys Antanaitis · ekstera informado
Vita Petronytė · junulara programo
Solveiga Sadauskaitė · kasisto
Jolanta Dudėnaitė · bonveniga servo
Laurynas Skūpas✞ · programo
Ramūnas Narbutas · giĉetoj, helpantoj
Marijus Dilba · kongresejo
Arimantas Račkauskas · konsilanto, scienca programo
Alfredas Maruška · handikapitoj, blindula kongreso
Algimantas Piliponis · lingvoproblema simpozio
Regina Dovidavičiūtė · interna informado
Sigitas Sidaravičius · turisma informado
Mečislovas Adomas Grikpėdis · kongresaj eldonaĵoj
Diemantė Aničienė · ekskursoj
Inesa Balaikienė · bonveniga servo
Ieva Vaigauskaitė · junulara programo
Irma Sabonytė · handikapitoj, blindula kongreso

90-a Universala Kongreso de Esperanto

# DUA BULTENO

Vilno

23-30 julio 2005

# Por eniri la landon

**Ĝenerale**. Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj, kaj ke ili ofte ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima kongreslanda diplomatia reprezentejo (bv. mem trovi ties adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi devas havi vizon, kaj sub kiuj kondiĉoj. UEA kaj LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2005, kaj principe ne povos respondi al tiaj malfruaj petoj.

**Vizoj**. La civitanoj de, interalie, jenaj landoj ne bezonas vizon por eniri Litovion (tamen konsilindas kontakti la plej apudan litovan ambasadejon por kontroli ĉu tiu ĉi informo ne ŝanĝiĝis intertempe!): Argentino, Armenio, Aŭstralio, Brazilo, Bulgario, Ĉilio, Ĉinio, EU-landoj, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Resp., Kroatio, Meksiko, Norvegio, Novzelando, Rumanio, Svisio, Usono, Urugvajo kaj Venezuelo.

La civitanoj de Bjelorusio, KazaĤio, Moldavio, Sudafriko, Rusio kaj Ukrainio ne bezonas havi specialan invitilon por *peti* la litovan vizon. Estos petataj financaj garantioj por la periodo dum kiu oni estos en Litovio.

---

La kongresanoj mem devas zorgi pri la akiro de vizo. En escepte komplikaj kazoj oni povas peti helpon de UEA aŭ LKK.

---

**Datoj**. Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresa daŭro (23-30 julio, eventuale plus daŭro de menditaj antaŭ- kaj/aŭ postkongresoj). Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

**Konfirmiloj kaj invitleteroj**. Normale la kongresa konfirmilo devus sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun UEA sendos se oni petas ĝin, al aliĝintaj kongresanoj el vizbezonaj landoj. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfimaĵojn. Bv. konscii ke nek UEA nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

**Mongarantio**. Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon, necesas pruvi ĉe la eniro en la landon ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al iu ajn kongresano. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando.

**Asekuroj**. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte taŭga asekuro estas aĉetebla ĉe flughavenoj.

# Utilaj informoj pri Litovio kaj Vilno



**Kongresejoj.** La ĉefa kongresejo estas en **Reval Hotel Lietuva**, Konstitucijos av. 20, la oficiala hotelo de la kongreso (vd. dekstre). Tie okazos ĉiuj fakaj kunsidoj, prelegoj, Interkona Vespero kaj kelkaj artaj aranĝoj. En la **Kongresa Palaco, Vilniaus Kongresu Rumai**, Vilniaus str. 6/14, trans la rivero ĉirkaŭ 500 metrojn for de Reval Hotel, okazos la artaj aranĝoj, kaj eventuale iuj grandaj renkontiĝoj. La Solena Inaŭguro, Nacia Vespero, Internacia Arta Vespero kaj Fermo de la kongreso okazos en **Siemens Arena**, Ozo str. 14a.

**Loĝantaro.** En la lando loĝas ĉirkaŭ 3 500 000 homoj, en Vilno – 542 000. Litovoj konsistigas 83,5%, poloj 6,7%, rusoj 6,3%. Litovio okupas areon de 65 300 km$^2$, en kvadrata kilometro loĝas 53,4 homoj. Du trionoj de la loĝantoj estas urbanoj, unu triono vilaĝanoj. Averaĝa vivodaŭro de viroj estas 65, de virinoj 77 jaroj. Virinoj konsistigas 53,2%, kaj viroj 46,8%.

**Klimato.** La klimato estas inter la kontinenta kaj mara. En julio la meza temperaturo de la aero estas +17 gradoj laŭ Celsio, humido 78%. Foje pluvas. Altklasaj hoteloj, restoracioj kaj vendejoj estas bone klimatizitaj.

**Lingvoj.** La litova lingvo estas la sola ŝtata lingvo. Ĝi estas la plej arkaika vivanta hindeŭropa lingvo, uzanta adaptitan latinan alfabeton el 32 literoj. En Vilno vi facile interkomunikiĝos ruse, kaj iom malpli facile pole. Kun junaj homoj vi povos interparoli angle.

**Mono.** Lido (Lt aŭ LTL) estas la sola valida mono. 1 lido egalas al 100 cendoj. 1, 2, 5 lidoj estas moneroj, 10, 20, 50, 100, 200 kaj 500 lidoj estas monbiletoj. Estas ebleco ŝanĝi vian valuton (eŭrojn, dolarojn, ktp) en bankoj kaj monaŭtomatoj. La kurzo de eŭro ĉiam estas konstanta: 1 eŭro = 3,45 Lt; la kurzo de la usona dolaro kaj de la aliaj valutoj ofte ŝanĝiĝas. En januaro 2005 unu usona dolaro egalis al ĉ. 2,70 lidoj. Multaj hoteloj, restoracioj, vendejoj akceptas kreditkartojn (VISA, Eurocard, American Express).

**Loka tempo.** Litovio estas en centra-eŭropa tempozono: UTC + 2 horoj (somere + 3 horoj).

**Trinkakvo.** Bonkvalita akvo kompare kun trinkakvo en aliaj landoj de EU. Vi povas aĉeti gasakvon aŭ mineralan akvon en vendejoj, sed tio ne estas nepra. Vendejoj laboras proksimume de la 8-a horo ĝis la 22-a horo.

**Elektro.** La elektra tensio estas 220-volta. La kontaktiloj estas dupolusaj.

**Transporto.** La ĉefa publika transporto en multaj urboj estas busoj, trolebusoj, minibusoj kaj taksioj. Bus/trolebus-biletoj por unu veturo kostas

80 cendojn; ili estas vendataj en gazetaj kioskoj. Se vi aĉetos bileton en buso/ trolebuso, vi devos pagi 1 lidon. Eblas aĉeti specialajn biletojn por unu, tri aŭ dek tagoj. Estas ebleco lui aŭtomobilon.

**Medikamentoj.** Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton en la latina.

**Sanservoj.** Eksterlandanoj havu konfirmilon pri sanasekuro. Por eniri Litovion ne estas necesa vakcinado. LKK kaj UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

**Telefonado.** El eksterlando al Vilno: +370-5-[7-cifera numero]. El aliaj litovaj urboj al Vilno: 8-5-[7-cifera numero]. Por voki eksterlanden el Litovio vi devas scii la kodon de la lando. Eblas telefoni el ĉiuj telefonbudoj rekte al eksterlando. La telefonbudoj uzas telefonkartojn aĉeteblajn en poŝtoficejoj kaj diversaj butikoj, gazetaj kioskoj. **Gravaj telefonnumeroj:** Polico, fajrobrigado kaj urĝa medicina helpo 112, informoj pri enlandaj telefon-numeroj 118 (en Vilno).

**Sekureco.** Vilno estas ĝenerale tute sekura urbo, tamen estu atentema pri dokumentoj, mono, poŝtelefonoj k.s.

**Memoraĵoj.** La plej bonaj memoraĵoj el Litovio estos faritaĵoj el sukceno (malmola flava fosilia rezino), teksaĵoj el lino, diversaj argilaĵoj kaj skulptitaj lignaj pecoj.

# Loĝado en Vilno

**Ĝeneralaj kondiĉoj de mendoj.** La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj plurloke en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Estas konsilinde legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

**Loĝdatoj**. Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso de la hotelo (foriro; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo).

**Eniro kaj eliro**. Principe, eblas okupi ĉambrojn post la tagmezo de la mendita dato kaj necesas forlasi la ĉambrojn ĝis la tagmezo de la lasta tago. Hoteloj estas normale flekseblaj pri tio. Se vi ne okupas ĉambron dum la unua mendita tago, oni kutime nuligas la rezervon, kaj vi perdas la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo.

**Dulitaj ĉambroj kaj hazarda kunloĝigo**. La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio du- kaj trilitajn ĉambrojn oni

disponigas *nur* al duopoj/triopoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi al homoj kiuj nepre volas loĝi en dulitaj (aŭ plurlitaj) ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, ĉe la retpaĝo de la kongreso (http://www.uea.org/kongresoj/uk_2005.html) troveblas anonctabulo por tiu celo.

**Frueco de la mendo kaj alternativaj mendoj.** Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue, kaj ne eblas garantii la plenumon de la originala mendo ĉiam laŭ la preciza deziro de la mendanto. Tial ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. En la retpaĝo de la kongreso eblas scii, kiuj hoteloj jam estas plenaj.

**Pagoj.** La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

**Ofertataj servoj.** La ĉambroj de la menciitaj hoteloj (ne de la gastejoj) havas telefonon, televidilon, duŝejon (kelkaj ankaŭ bankuvon) kaj necesejon. La prezo inkluzivas la matenmanĝon, krom se menciite alie.

**Limdatoj.** La limdato por fari mendojn estas la 1-a de majo 2005. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio, kaj nepre kontraŭ aparta krompago (40 eŭroj). Pri malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo.

**Loĝkonfirmoj.** Minimume unu monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravaĵoj.

**La prezoj estas en eŭroj (EUR) por unu persono por unu nokto.**

## Hoteloj kaj aliaj loĝebloj

*La hoteloferto en Vilno estas tre varia, por ĉiuj buĝetoj kaj por ĉiuj plaĉoj. Tamen, ĝi ne estas senlima! Ĉefe la plej malmultekostaj loĝejoj havas malmulte da lokoj, pro tio ke temas pri etaj konstruaĵoj. Ĉiuj loĝejoj, kiuj troviĝas for de la ĉefa kongresejo (Reval Hotel Lietuva) estas atingeblaj pere de publika transporto. Kiel pasintjare, ĉi-jare eblas mendi pere de la retpaĝo de la kongreso,* http://www.uea.org/kongresoj/uk_2005.html. *La avantaĝo mendi pere de la retpaĝo de la UK estas, ke oni povas vidi ĉu estas liberaj lokoj en la elektita loĝejo kaj tuj rezervi lokon. Post kiam vi mendas, vi havas unu semajnon da tempo por ke la pago de la loĝejo estu plenumita. Post tiu tempo, se la pago ne atingas la Centran Oficejon de UEA aŭ la landan peranton, la mendoj estos nuligitaj! La prezo de la ĉambro inkluzivas matenmanĝon, krom se alie indikite. Pro la loka vetero, kiu estas tre milda, t.e. ne varma, nur kelkaj hoteloj havas klimatizilon. Hoteloj kun klimatiziloj*


*estas indikitaj. Krome, por faciligi la elekton, estas indikite en kvar diversaj areoj (ĝis unu km, inter unu kaj du km, inter du kaj tri km kaj pli ol tri km) kiom for de Reval Hotel troviĝas la aliaj hoteloj/loĝejoj.*




**1. Reval Hotel Lietuva** (4★), Konstitucijos av. 20. La oficiala hotelo de la kongreso. Antaŭnelonge renovigita 22-etaĝa hotelo; ĝi situas ĉe la bordo de la rivero Neris, centre en Vilno, je nur 10 minutojn piede for de la mezepoka Malnova Urbo. Ĉiuj ĉambroj havas skribotablon, telefonon kun rekta ekstera linio, kablan televidilon kun senpagaj kaj pagotaj programoj, interretkonekton, etan fridujon, hararsekigilon kaj enĉambran klimatizilon. La hotelo havas ankaŭ: enĉambran servadon, vestaĵlavadon, sekurŝrankojn, restoraciojn Riverside ternivele kaj trinkejon/kafejon Sky Bar je la 22-a etaĝo, kazinon, ekzercejon, saŭnon kaj naĝbasenon. La hotelo troviĝas je 9 km de la flughaveno, 6 km de la fervojstacidomo kaj busstacio, 2 km de la Malnova Urbo kaj 4 km de Arena Siemens. *Loko en ĉambro: unupersona 102 EUR, dulita 63 EUR.*



**2. Crowne Plaza Vilnius** (5★), M.K. Ciurlionio str. 84 (pli ol tri km for de Reval Hotel). Situas apud la plej granda urba parko, Vingis-Parko. Ĉiuj ĉambroj havas skribotablon, telefonon, kablan kaj satelitan televidilon, interretkonekton, etan fridujon, hararsekigilon, pantalongladilon, teo/kafo-farilon kaj enĉambran klimatizilon. La hotelo havas ankaŭ enĉambran servadon, vestaĵlavadon, sekurŝrankojn ĉe la akceptejo, restoraciojn Seasons, kafejojn ĉe la ternivelo kaj en la 16-a etaĝo, ekzercejon, saŭnon, internan naĝejon, komunikadservan ĉambron, *Jacuzzi*-bankuvo kaj kunsidejojn. Transporto al Reval Hotel kostas EUR 2,00 tien kaj EUR 2,00 reen. *Loko en ĉambro: unupersona 81 EUR, dulita 46 EUR.*




**3. Holiday Inn Vilnius** (4★), Seimyniskiu str. 1, (ĝis unu km for de Reval Hotel). Troviĝas en la urbocentro, apud la Malnova Urbo, la historia koro de Vilno. Ĉiuj ĉambroj havas brulizolajn fenestrojn, klimatizilon, telefonon, satelitan televidilon, hararsekigilon, etan fridujon kaj skribotablon kun diversaj komputilkonektoj. En la hotelo estas ankaŭ: ĉambra servado, vestaĵlavejo, sekurŝranko ĉe la akceptejo, kvar kunsidejoj, komunikadserva ĉambro, kafejo, eta ekzercejo, saŭno kaj restoracio Eldorado, kun granda elekto de naciaj kaj internaciaj pladoj. *Loko en ĉambro: dulita 60 EUR.*




**4. Novotel** (4★), Gedimino av. 16 (inter unu kaj du km for de Reval Hotel). Situas en la koro de la urbo, en la historia kaj komerca centro de Vilno. Ĝiaj modernaj ĉambroj havas klimatizilon, sekurŝrankon, fridujeton, radion, satelitan kaj kablan televidilon kaj hararsekigilon. En la hotelo estas restoracio, kafejo, ekzercejo, saŭno, kunsidejoj, enĉambra servado, sekurŝranko en la akceptejo


kaj komunikadserva ĉambro. *Loko en ĉambro: unupersona 81 EUR, dulita 46 EUR.*




**5. Citypark** (4★), Stuokos Gucevičiaus str. 3 (inter du kaj tri km for de Reval Hotel). Situas en la koro de la urbo, antaŭ la katedralo. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon kun rekta ekstera linio, kablan televidilon, hararsekigilon, etan fridujon kaj senpagan interretkonekton. En la hotelo estas itala restoracio Rossini, saŭno kun naĝejo, sekurŝrankoj, lavejo kaj kunvenejoj. *Loko en ĉambro: unupersona 74 EUR, dulita 44 EUR.*



**6. Best Western Naujasis Vilnius** (3★), Konstitucijos av. 14 (ĝis unu km for de Reval Hotel). Situas ĉe la dekstra flanko de la rivero Neris, en areo nomata *Nova Vilna Komercada Centro*. Ĉiuj ĉambroj havas satelitan televidilon, etan fridujeton, hararsekigilon, telefonon kun rekta ekstera linio, interretkonekton kaj skribotablon. Krome en la hotelo estas enĉambra servado, lavejo, valiza stakejo, sekurŝrankoj, restoracio kaj kafejo, vintra ĝardeno, kunsidejoj, komunikadserva ĉambro, ekzercejo, saŭno kaj naĝejo. *Loko en ĉambro: unupersona 99 EUR, dulita 55 EUR.*



**7. Congress Hotel** (3★), Vilniaus str. 2/15 (ĝis unu km for de Reval Hotel). Situas plej urbocentre en Vilno. La hotelo, kies konstruaĵo estis konstruita en la 17-a jarcento, troviĝas ĉe la bordo de la rivero Neris, ĉe la legenda verda ponto Zaliasis, tuj apud la Kongrespalaco, kie okazos ĉefe artaj aranĝoj de la 90-a UK. La hotelĉambroj enhavas satelitan televidilon, telefonon kun rekta ekstera linio, etan fridujon, interretkonekton, klimatizilon, kontraŭ-luman kurtenon kaj hararsekigilon. En la hotelo estas ankaŭ sekurŝranko ĉe la akceptejo, saŭno, restoracio, konferencejo kaj ekzercejo. *Loko en ĉambro: unupersona 75 EUR, dulita 45 EUR.*




**8. Sarunas** (3★), Raitininku str. 4 (inter unu kaj du km for de Reval Hotel). Situas en la urbocentro ĉe la riverbordo de la rivero Neris. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon, interretkonekton, skribotablon, televidilon, radio-vekilon, fridujeton, hararsekigilon kaj klimatizilon. Krome, en la hotelo estas enĉambra servo, rapidlavejo, sekurŝranko, valizdeponejo, komunikadserva ĉambro, kunsidejoj, restoracio, ekzercejo kaj saŭno. *Loko en ĉambro: dulita 34 EUR, dupersona (1-lita) 34 EUR.*




**9. Ratonda** (3★), Gedimino av. 52/1 (inter unu kaj du km for de Reval Hotel). Situas plej centre en Vilno, ĉe la Parlamentejo kaj Ministrejoj. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon, televidilon kun senpagaj kaj pagotaj programoj, fridujeton


kaj interreton. Krome, en la hotelo ankaŭ estas enĉambra servo, lavejo, faksilo, fotokopiilo, kunsidekipaĵoj, sekurŝrankoj en la akceptejo, restoracio kaj kafejo. *Loko en ĉambro: unupersona 74 EUR, dulita 41 EUR.*




**10. Europa City Vilnius** (3★), Jasinskio str. 14 (inter unu kaj du km for de Reval Hotel). Ekfunkciis en aprilo 2003. La hotelo situas en la urbocentro, apud la parlamentejo. Ĉiuj ĉambroj havas klimatizilon, telefonon, satelitan televidilon, hararsekigilon, etan fridujon kaj interretkonekton. En la hotelo estas restoracio, kafejo, ekzercejo, saŭno, kunsidejoj, enĉambra servado, sekurŝrankoj, rapidlavejo, komunikadserva ĉambro kaj kvar kunsidejoj. *Loko en ĉambro: dulita 34 EUR.*




**11. Atrium** (3★), Pilies str. 10 Vilnius (inter du kaj tri km for de Reval Hotel). Situas en ĵus renovigita konstruaĵo de la 16-a jarcento en unu el la plej malnovaj stratoj de Vilno, ĉirkaŭita de diversaj monumentoj el la pasinteco. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon, satelitan televidilon, interretkonekton, fridujeton, hararsekigilon, sekurŝrankon kaj enĉambran klimatizilon. Krome en la hotelo estas argentina restoracio El Gaucho Sano, kunvenejoj, kafejo, saŭno kaj *Jacuzzi*-bankuvo. *Loko en ĉambro: unupersona 69 EUR, dulita 48 EUR.*




**12. Baltpark Vilnius Hotel** (3★), Ukmerges str. 363 (pli ol tri km for de Reval Hotel). Estas nova mezkategoria hotelĉeno en la baltaj landoj. Kun internacia kvalito, la hotelo ofertas puran kaj freŝan etoson. Ĉiuj ĉambroj havas televidilon, radio-vekilon, telefonon kaj ekskluzivan ĉambran lumigadon. En la hotelo estas kunsidejoj, kafejo, sekurŝrankoj kaj vestaĵlavejo. Transporto tien/reen al Reval Hotel estas senpaga. *Loko en ĉambro: dulita 27 EUR, dupersona (1-lita) 27 EUR.*




**13. City Gate** (3★), Bazilijonu str. 3 (pli ol tri km for de Reval Hotel). Situas en la Malnova Urbo, apud la Pordego de la Sunleviĝo. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon, interretkonekton, televidilon kaj klimatizilon. En la hotelo estas kunvenejoj, restoracio, interna ĝardeno, enĉambra servo, lavejo kaj sekurŝranko ĉe la akceptejo. *Loko en ĉambro: dulita 38 EUR, trilita 33 EUR.*



**14. Acappella** (3★), Dariaus ir Gireno str. 61 (pli ol tri km for de Reval Hotel). Situas apud la Internacia Flughaveno de Vilno. Ĉiuj ĉambroj havas satelitan televidilon kaj telefonon. En la hotelo estas lavejo, enĉambra servo kaj restoracio Acappella. Transporto tien/reen al Reval Hotel estas senpaga. *Loko en ĉambro: dupersona (1-lita) 33 EUR.*



**15. Ecotel Vilnius** (2★), Slucko str. 8 (ĝis unu km for de Reval Hotel). Estas la plej granda ekonomi-klasa hotelo en Litovio. Ĝi situas en la urbocentro, ĉe la dekstra flanko de la rivero Neris. La ĉambroj estas modernaj kun satelitaj televidiloj kaj telefono. En la hotelo ankaŭ estas interretkonekto, kafejo kaj du konferencejoj. *Loko en ĉambro: unupersona 49 EUR, dulita 27 EUR, trilita 23 EUR.*



**16. Ad Astrum** (2★), Seimyniskiu str. 21 (inter unu kaj du km for de Reval Hotel). La hotelo estas reklamata kiel ekonomi-klasa hotelo, situanta en la centro de Vilno. La necesejoj kaj duŝejoj estas komunaj por ĉiuj du/tri ĉambroj. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon kaj kablan televidon. En la hotelo estas ankaŭ restoracio, saŭno, naĝejo kaj kunsidejo. *Loko en ĉambro: unupersona 52 EUR, dulita 27 EUR.*



**17. Ambassador** (2★), Gedimino av. 12 (inter unu kaj du km for de Reval Hotel). Situas en la ĉefa strato de Vilno, apud la operejo, drama teatro, katedralo kaj ŝtata palaco. La ĉambroj havas kablan televidilon kaj telefonon. En la hotelo estas sekurŝrankoj, rapidlavejo kaj kafejo. Tuj apude estas interretkafejo. *Loko en ĉambro: dulita 39 EUR.*




**18. Domus Maria Guest House** (2★), Ausros vartu str. 12 (inter du kaj tri km for de Reval Hotel). Situas en la vera koro de la Malnova Urbo de Vilno, en la 15-a-jarcenta arkitektura grupiĝo kiu inkluzivas la Pordegon de Sunleviĝo, frubarokan Sankta-Teresas-Preĝejon kaj la eks-Karmelitan Monaĥejon. La ĉambroj estas aranĝitaj en la renovigitaj eks-monaĥejaj dormoĉambroj. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon, interretkonekton kaj televidilon. En la hotelo estas sekurŝranko, valizdeponejo, interngardena kafejo kaj konferencejoj. La akceptejo funkcias 24 horojn tage. *Loko en ĉambro: unupersona 50 EUR, dulita 33 EUR, trilita 28 EUR, kvarlita 22 EUR.*




**19. Micotel Comfort** (2★), Geliu str. 5 (pli ol tri km for de Reval Hotel). Estis inaŭgurita en majo 2004. Ĝi situas en la Malnova Urbo. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon kaj satelitan televidilon. La hotelo havas ankaŭ vestaĵlavejon kaj senpagajn sekurŝrankojn. *Loko en ĉambro: unupersona 44 EUR, dulita 32 EUR, dupersona (1-lita) 32 EUR.*

**20. Victoria** (1★), Saltoniskiu str. 56 (inter unu kaj du km for de Reval Hotel). Situas en la historia kvartalo Zverynas. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon kaj satelitan televidilon. En la hotelo estas faksilo, fotokopiilo, komputilo kun interretkonekto, kafejo Tropic kaj kunsidejoj. *Loko en ĉambro: unupersona 43 EUR, dulita 27 EUR.*



**21. Hostel Jnn**, Konstitucijos av. 25 (ĝis unu km for de Reval Hotel). Konstruita en 1985 kiel junulcentro, ĝi estas ĉiam plena de gejunuloj. La du- kaj kvarlitaj ĉambroj estas puraj kaj modernaj, kun propraj necesejoj kaj duŝejoj. Ne estas matenmanĝo. *Loko en ĉambro: dulita 23 EUR, kvarlita 19 EUR.*


**22. Hostel Vpu**, Studentu str. 41 kaj Studentu str.47 (ĝis unu km for de Reval Hotel). Troviĝas en la urbocentro, ĉe la dekstra flanko de la rivero Neris. Estas ofertataj du- kaj trilitaj ĉambroj. Ĉiuj etaĝoj komune uzas la kuirejon, necesejojn kaj lavejojn. Duŝejoj, apartaj por viroj kaj virinoj, estas en la kelo de la konstruaĵo. Ne estas matenmanĝo. *Loko en ĉambro: trilita 9 EUR.*



**23. Hostel Uzupio**, Paupio str. 31a (inter du kaj tri km for de Reval Hotel). Situas en la Malnova Urbo, apud St.-Annes-preĝejo kaj rivero Vilnelė. En la gastejo estas du-, tri- kaj kvarlitaj ĉambroj. Duŝejoj kaj necesejoj estas komunaj por ĉiu etaĝo. Krome, la gastoj povas uzi la kuirejon, lavejon, interreton kaj spekti la komunan televidilon. Matenmanĝo ne estas provizata. *Loko en ĉambro: dulita 16 EUR, trilita 15 EUR, kvarlita 14 EUR.*

**24. Hostel Jtc**, Polocko str. 7 (inter du kaj tri km for de Reval Hotel). Situas en la Malnova Urbo, apud St.-Annes-preĝejo kaj la rivero Vilnelė. En la gastejo estas tri- kaj kvarlitaj ĉambroj. Duŝejoj kaj necesejoj estas komune uzataj laŭ etaĝoj. Matenmanĝo ne estas provizata. *Loko en ĉambro: trilita 11 EUR, kvarlita 10 EUR.*

**25. Hostel Filaretai**, Filaretu str. 17 (inter du kaj tri km for de Reval Hotel). Situas ĉe la verdaj bordoj de la Malnova Urbo de Vilno. En la gastejo estas du-, tri-, kvar-, kvin-, ses-, sep- kaj oklitaj ĉambroj. La gastoj rajtas komune uzi la kuirejon, manĝoĉambron, televidil- kaj radiĉambron kaj lavejon. La necesejoj kaj duŝejoj estas por komuna uzo laŭ etaĝoj. Matenmanĝo ne estas provizata. Surloke en la gastejo estos sciate en kiu ĉambro oni dormos kaj kiuj estos la kunloĝantoj! *Loko en ĉambro: 13 EUR.*



**26. Studenta/Junulara Gastejo 4**, Sauletekio av. 4 (pli ol tri km for de Reval Hotel). Situas en la kvartalo Antakalnis kaj havas du-, tri- kaj kvarlitajn ĉambrojn. Duŝejoj kaj necesejoj estas komunaj por ĉiu etaĝo. La kuirejo, kun ĉiuj necesaj kuiriloj, kaj la televidilĉambro, kiu estas en la tria etaĝo, estas por komuna uzo. Ne estas matenmanĝo. *Loko en ĉambro: dulita 9 EUR, trilita 8 EUR, kavrlita 7 EUR.*



**27. Studenta/Junulara Gastejo 39,** Sauletekio av. 39 (pli ol tri km for de Reval Hotel). Situas en la kvartalo Antakalnis kaj havas du- kaj trilitajn ĉambrojn. Po du ĉambroj komune uzas necesejon kaj lavabon. La duŝejoj kaj kuirejoj estas komune uzataj por ĉiu etaĝo. Ne estas matenmanĝo. *Loko en ĉambro: dulita 9 EUR, trilita 8 EUR.*



**28. Studenta/Junulara Gastejo 59,** Didlaukio str. 59 (pli ol tri km for de Reval Hotel). Situas en la kvartalo Baltupiai kaj havas du- kaj trilitajn ĉambrojn. Po du ĉambroj komune uzas necesejon, lavujon kaj duŝejon. Ne estas matenmanĝo. *Loko en ĉambro: dulita 9 EUR, trilita 8 EUR.*

# Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

La antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj ebligos al la partoprenantoj havi unikajn kaj ravajn spertojn. Ĉiuj ekskursoj profunde konatigos vin kun la lokaj naturoj, historioj kaj kulturoj. Unika okazo konatiĝi kun la baltaj landoj kaj Sankt-Peterburgo.

La ekskursoj inkluzivas:

– restadon en hoteloj minimume 3-stelaj (la ekskurso al Sankt-Peterburgo inkluzivas du tranoktojn en trajno, en kupeo kvar-persona);
– matenmanĝon en la hoteloj
– unu tag- *aŭ* vespermanĝon tage;
– transporton dum la ekskurso en altkvalitaj klimatizitaj aŭtobusoj;
– enirbiletojn por la vizitotaj lokoj (krom se alie indikite);
– Esperantajn ĉiĉeronojn.

La ekskursoj *ne* inkluzivas:

– ekstrajn elspezojn en la hoteloj (ekz. trinkmono);
– trinkaĵojn dum la manĝoj;
– transportojn de/al la flughavenoj;
– tnu tag- *aŭ* vespermanĝon tage.

Ĉiuj ekskursoj devas havi *minimume 20* partoprenantojn. Se estos malpli ol 20 partoprenantoj en iuj ekskursoj, la prezoj altiĝos *aŭ la koncernaj ekskursoj estos nuligitaj*. En tiaj kazoj la partoprenontoj estos ĝustatempe informitaj pri tio kaj povos ŝanĝi al alia aŭ entute malmendi la ekskurson.

Pro lokaj cirkonstancoj ĉiuj ekskusoj povas havi *maksimume 40* partoprenantojn! Se vi interesiĝas pri iu ekskurso kaj nepre volas partopreni en ĝi, tiam ni konsilas vin rapide mendi ĝin.

Por la tag- aŭ vespermanĝoj kiujn la prezo ne inkluzivas, la ĉiĉerono konsilos pri taŭgaj manĝejoj.

# Vizitotaj urboj kaj vidaĵoj

**Rumšiškės,** subĉiela etnografia muzeo je 20 km de Kaunas. En teritorio de 175 ha estas 140 bone konservitaj, originalaj konstruaĵoj datantaj de ekde la 18-a jarcento el diversaj etnografiaj regionoj de Litovio. Inter la konstruaĵoj troviĝas loĝejoj, grenejoj, draŝmaŝinoj, brutejoj ktp, ĉiuj en harmonio kun la belega loka naturo.

**Kaunas,** la dua urbo de Litovio, inter la riveroj Némunas kaj Neris. Unuafoje oficiale menciita en 1030. La post-restinta labirinto de stratetoj en la malnova urboparto atestas pri la signifa pasinteco de Kaunas kiel komerca centro. Ĝi estis provizora ĉefurbo en la komenco de la 20-a jarcento. Vizitotaj lokoj: Kaunas-Kastelo, Urbodomo (konata kiel la Blanka Cigno), Vytautas-preĝejo, Domo de Tondroj, Katedralo (fondita en 1408), parko de la Milit-muzeo kaj promenstrato Laisves aleja (avenuo de Libereco). Krome eblos viziti la artgalerion de la bone konata litova pentristo kaj komponisto, M.K. Čiurlionis.

**Palanga,** la plej populara kaj disvolvita ripozejo ĉe la maro en Litovio. Vizitotaj lokoj: Botanika ĝardeno, Sukcena muzeo, Palaco de Grafo Tyszkiewicz kaj la fama Palanga marponto.



**Šiauliai, Monteto de krucoj**, unika religia esprimiĝo de la litova religia sento. Neforgesebla loko kun pli ol 50 mil krucoj sur du etaj montoj.



**Klaipėda,** ofte nomita "Vojo al la maro" pro sia marhaveno, la ĉefa en Litovio. La urbo estis fondita en 1252 fare de la vic-mastro de la Litova Ordeno, Eberhardt von Sein. Vizitotaj lokoj: Malnova Poŝtoficejo, historia Malnova Urbo kun siaj manartaĵaj vendejoj, Malnova Teatro, placo Simon Dach.

**Kurŝa terlango**, nacia parko antaŭnelonge akceptita en la Unesko-listo de Mondheredaĵoj pro sia impresa naturo.

**Nida**, la plej malnova setlejo en Neringa. La nuna Nida ekestis kiam enloĝantoj de la Malnova Nida, apud la Granda Duno, translokiĝis pro la sablo kiu kovris la lokon, en la komenco de la 18-a jarcento.

**Monteto de sorĉistinoj,** komikaj popolskulptaĵoj liniiĝantaj sur vojo trans la monteto.

**Trakai**, malnova ĉefurbo de la Granda Duklando de Litovio, 27 km okcidente de Vilno; perfekta loko por ekstera promenado. La kastelo en Trakai, situanta sur insulo en la mezo de la Lago

Galve, estas la plej fama kaj fotata loko en Litovio. La kvin-etaĝa, ruĝŝtona fortikaĵo estis konstruita laŭ ordono de la Granda Duko Vytautas en la dua duono de la 14-a jarcento. Li ankaŭ invitis siajn korpgardistojn, Tataroj el Krimeo, ekloĝi ĉirkaŭ la kastelo. Iliaj posteuloj, la karaimoj, tjurka etna grupo, ĝis hodiaŭ donas specialan etoson al la reĝa urbo.

**Tallinn**, la estona ĉefurbo, kie oni vizitos la Malnovan Urbon, la turojn "Longa Hermann" kaj "Dika Margarete", la Urbodomon, Sanktaj Olav- kaj Nikolaan preĝejojn, Pirita-n monaĥejon, Olimpikan jaĥtcentron kaj la grandan Kanonvalon.



"**Rocca-al-Mare**", subĉiela muzeo elmontranta la riĉan estonan kamparan arkitekturon, kun ĉirkaŭ 70 konstruaĵoj. Inter ili estas domoj de bonhavaj kaj malriĉaj homoj.

**Gauja Nacia Parko** apud **Sigulda**. La ĉirkaŭoj de la parko estas ofte nomataj la Svisio de Latvio. Tri famaj kasteloj situis sur la apudaj montetoj, el kiuj de unu ni vizitos la ruinojn. Tiu kastelo, de la Ordeno de Kavaliroj, estis konektita kun apudaj konstruaĵoj pere de subteraj vojoj. Vizitoj ankaŭ al la Parko de Skulptaĵoj, dediĉita al la latva folkloro, al la Kastelo de la Episkopo kaj al la Gutmann-a Groto.

**Cesis**, belega mezepoka hansa urbo en la koro de Vidzeme, Latvio.

**Rīga**. La Malnova Urbo de Rīga situas inter la rivero Daugava kaj la urba kanalo. En la mezepoko ĝi estis centro de komercado, kaj oni tion rimarkas. La domoj de la komercistoj, gildoj kaj preĝejoj aparte montras la klason kaj bonhavon. Inter la historiaj konstruaĵoj de la Malnova Urbo estas la mezepokaj urbaj muroj el la 13-a jarcento, la Turo de Pulvoro, unu el la plej malnovaj en Rīga, la Sveda Pordego, Rīga-Kastelo, la domo de la Tri Fratoj, la preĝejo de Sankta Jakobo kaj la Katedralo. En aŭgusto 2001 Rīga iĝis 800-jara.



**Rundale.** La Rundale-Palaco estas baroka, rokoka kaj franc-stila parko, dezajnita de B.F. Rastrelli, ital-rusa arkitekto. Li dezajnis ankaŭ la Vintran Palacon kaj aliajn grandajn konstruaĵojn en Sankt-Peterburgo kaj la Catharine-kastelon en Tallinn.

**Sankt-Peterburg.** La ekskurso konatigos vin kun la arkitekturo, historio kaj nuntempa vivo de la malnova Rusa Imperio kaj kun la historio de la Romanov-a dinastio. Ni vizitos, interalie, la Palacan Placon kun la Vintra Palaco, la Placon de Artoj kun la Rusa Muzeo, la Smolny-monaĥejon, la faman Nevsky-avenuon, la Someran Ĝardenon, la Marsan Kampon, la Senatan Placon kun la famaj Bronzaj Kavaliroj, la sablolangon de Basil-insulo, la Fortikaĵon de Petro kaj Paŭlo, la unuan konstruaĵon de Sankt-Peterburgo, la Katedralon de Isako, kaj la Ermitejon (Hermitage) kun ĝia tri milionoj da koletopecoj. Boata krozo sur la rivero Neva kaj kelkaj aliaj el la 66 rivereto j kaj kanaloj ebligos al vi havi kompletan trarigardon de la "Venecio de la Nordo".

# Antaŭkongresaj ekskursoj

## A1 Litovio, lando de sukceno

*18-22-a de julio, aŭtobuse, 5 tagoj/4 noktoj*

---

18.07 Alveno al Vilno, tranokto en Hotelo Reval Lietuva.

19.07 Vilno – Rumšiškės – Kaunas – Šiauliai (250 km). Vizito de etnografia Muzeo de Popola Vivmaniero en Rumšiškės. Lunĉo en Kaunas, ekskurso tra malnova urboparto de Kaunas, promeno laŭ Laisvės alėja, ebleco viziti art-galerion de M.K. Čiurlionis. Posttagmeze forveturo al Šiauliai kaj tranokto tie.

20.07 Šiauliai – Palanga – Klaipėda (180 km). Survoje de Šiauliai al Palanga halto ĉe Monteto de Krucoj. Palanga estas la ĉefa litova ĉemara banurbo; ĉi tie oni vizitos la Muzeon de Sukceno kaj promenos tra Botanika Parko kaj sur Mara Ponto. Alveno al Klaipėda, tagmanĝo kaj tranokto.

21.07 Klaipėda – Nida – Klaipėda (100 km). Ekskurso tra Klaipėda kaj posttagmeze veturo al Kurŝa terlango tra la 100-km-longa poŝta strato kiu trairas la Nacian Parkon, antaŭnelonge akceptitan en la Unesko-listo de Mondaj Heredaĵoj. Oni promenos sur sablaj dunoj, post lunĉo vizitos dometon de la germana verkisto nobelpremiita T. Mann, aliajn loĝlokojn de la terlango, monteton de sorĉistinoj k.a. Reveno al Klaipėda kaj tranokto.

22.07 Klaipėda – Trakai – Vilno (320 km). Revenante oni vizitos la antikvan ĉefurbon Trakai kaj surinsulan kastelon. Lunĉo en Trakai. Reveno al Vilno kaj fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 570 EUR, dulita 455 EUR.

## A2 Tra tri baltaj landoj

*17-22-a de julio, aŭtobuse, 6 tagoj/5 noktoj*

---

17.07 Alveno al la estona ĉefurbo Tallinn kaj tranokto en Reval Hotel Olumpia.

18.07 Ekskurso tra Tallinn dum la tuta tago al, interalie, la Malnova Urbo, Urbodomo, turoj "Longa Hermann" kaj "Dika Margarete", preĝejoj kaj muzeoj. Lunĉo. Dua tranokto en Tallinn.

19.07 Tallinn Nacia Parko Gauja Rīga (350 km). Matene forveturo el Tallinn. Survoje vizito al Nacia Parko en Gauja (Latvio). Lunĉo en Sigulda. Alveno al Rīga kaj tranokto.

20.07 Rīga Rundale Šiauliai (160 km). Ekskurso tra Rīga; lunĉo. Posttagmeze veturo al Rundale kaj vizito de la palaco. Survoje al Šiauliai halto ĉe Monteto de Krucoj (en Litovio). Alveno al Šiauliai kaj tranokto.
21.07 Šiauliai Klaipėda Nida (220 km). Mallonga ekskurso tra Klaipėda kaj lunĉo. Forveturo al Kurŝa terlango, konatiĝo kun vidindaĵoj de Nacia Parko. Tranokto en Nida.
22.07 Nida – Kaunas – Vilno (360 km). En Kaunas ekskurso tra malnova urboparto, konatiĝo kun ĝiaj vidindaĵoj, ebleco viziti artgalerion de M.K. Čiurlionis. Lunĉo en Kaunas. Forveturo al Vilno kaj fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 790 EUR, dulita 620 EUR.

**Ekstraj noktoj en Reval Hotel Olumpia (4★), Tallinn:** Unupersona 115 EUR, dulita 63 EUR. Adreso: Liivalaia 33, 10118 Tallinn, Estonio; ☎+372 631 5333.

## **A3** Sankt-Peterburgo

*18-22-a de julio, trajne, 5 tagoj/4 noktoj*

---

18.07 Alveno al Vilno. Vespere transporto de Reval Hotel al la Fervoja Stacidomo kaj forveturo per trajno al Sankt-Peterburgo (700 km).
19.07 Matene alveno al Sankt-Peterburgo. Vizito de urbaj vidindaĵoj, inter ili placoj, palacoj kaj muzeoj, kaj konatiĝo kun la historio de la Romanov-oj. Enhoteliĝo kaj vespermanĝo en la hotelo.
20.07 Vizito al Ermitaĝo matene kaj perŝipa ekskurso laŭ riveroj kaj kanaloj posttagmeze. Vespermanĝo en la hotelo.
21.07 Vizito de parko kaj palaco en Puŝkin. Lunĉo. Posttagmeze libera tempo. Fruvespere forveturo al Vilno (per trajno).
22.07 Matene alveno al Vilno, transporto al Reval Hotel kaj fino de la servoj.

*<u>Avertoj</u>: Partoprenantoj devas mem akiri vizon por Rusio!*
*Oni vojaĝas en kvarpersona kupeo kun lito (sendepende ĉu estis mendita unu- aŭ dulita ĉambro)! Ne estas inkluzivigita matenmanĝo en la trajno. Eblas aĉeti la matenmanĝon dum la trajnvojaĝo!*

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 755 EUR, dulita 615 EUR.

**A1 + A3 Ekstraj noktoj en Reval Hotel Lietuva (4★) en Vilno:** Unupersona 102 EUR, dulita 63 EUR. Adreso: Konstitucijos pr. 20, Vilnius, Litovio; ☎+370 5 272 62 00.

# Postkongresaj ekskursoj

## P1 Ora baltmara strando

*31.07 – 02.08, aŭtobuse, 3 tagoj/2 noktoj*

---

31.07 Vilno – Kaunas Klaipėda (310 km). Matena ekveturo de Vilno al Kaunas. En Kaunas ekskurso tra malnova urboparto. Ebleco viziti artgalerion de M.K. Čiurlionis. Lunĉo en Kaunas kaj ekveturo. Alveno kaj tranokto en Klaipėda.

01.08 Klaipėda – Nida (100 km). Matene ekskurso tra Klaipėda kaj lunĉo. Posttagmeze veturo al Kurŝa terlango, ĝis Nida, vizito de tieaj vidindaĵoj. Reveno al Klaipėda kaj tranokto.

02.08 Klaipėda – Palanga – Vilno (360 km). Post matenmanĝo forveturo al Palanga, mara banurbo. Vizito al Botanika Parko kaj Muzeo de Sukceno. Dum reveturo halto ĉe la Monteto de Krucoj. Lunĉo en Šiauliai. Vespere reveno al Vilno kaj fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 350 EUR, dulita 285 EUR.

## P2 Vilno – Rīga – Tallinn – Vilno

*31.07 – 04.08, aŭtobuse, 5 tagoj/4 noktoj*

---

31.07 Vilno – Rīga (300 km). Post la matenmanĝo forveturo al Rīga kun halto survoje en Rundale. Vizito de baroka-rokoka palaco kaj francstila parko. Lunĉo en Rundale. Alveno al Rīga kaj tranokto.

01.08 Rīga. Matena ekskurso tra la belega Malnova Urbo de la latva ĉefurbo. Lunĉo. Posttagmeze libera tempo. Dua tranokto en Rīga.

02.08 Rīga – Tallinn (300 km). Post matenmanĝo forveturo al Tallinn. Survoje vizito al Estonia Etnografia Subĉiela Muzeo en Rocca-al-Mare. Posttagmeze alveno al Tallinn, enhoteliĝo kaj vespermanĝo.

03.08 Tallinn – Cesis (220 km). Matene ekskurso tra la estona ĉefurbo. Posttagmeze forveturo al Cesis (en Latvio). Vespermanĝo kaj tranokto en Cesis.

04.08 Cesis – Sigulda – Vilno (380 km). Post matenmanĝo forveturo al Sigulda. Vizito al Nacia Parko Gauja kie troviĝas, interalie, la 13-ajarcenta Kastelo de la Kavalira Ordeno, kiu konektiĝas kun apudaj konstruaĵoj per subteraj vojoj. Lunĉo en Sigulda. Vespere reveno al Vilno kaj fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 695 EUR, dulita 550 EUR.

## **P3** Vilno – Rīga – Tallinn

*31.07 – 05.08, aŭtobuse, 6 tagoj/5 noktoj*

---

31.07 Vilno – Kaunas – Klaipėda – Nida (360 km). Matena forveturo de Vilno al Kaunas. En Kaunas ekskurso tra malnova urboparto. Ebleco viziti artgalerion de M.K. Čiurlionis. Lunĉo en Kaunas. Alveno al Klaipėda kaj mallonga ekskurso tra la havenurbo. Vespere forveturo al Nida kaj tranokto.

01.08 Nida – Šiauliai – Rīga (370 km). Ekskurso tra Nacia parko de Kurŝa terlango kaj lunĉo. Posttagmeze forveturo al Rīga; survoje vizito de Monteto de Krucoj. Vespere alveno al Rīga kaj tranokto.

02.08 Rīga – Rundale – Rīga (170 km). Matene ekskurso tra Rīga. Lunĉo. Posttagmeze forveturo al Rundale, vizito de la palaco kaj parko. Vespere reveno al Rīga, tranokto.

03.08 Rīga – Nacia Parko de Gauja – Tallinn (350 km). Post matenmanĝo forveturo al Tallinn. Survoje vizito de Gauja Nacia Parko. Lunĉo en Sigulda. Alveno al Tallinn kaj tranokto.

04.08 Tallinn. Ekskurso tra la urbo. Lunĉo. Posttagmeze vizito al Estonia Etnografia Subĉiela Muzeo en Rocca-al-Mare. Dua tranokto en Tallinn.

05.08 Tallinn. Matenmanĝo kaj fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 840 EUR, dulita 660 EUR.

**Ekstraj noktoj en Reval Hotel Olumpia (4★), Tallinn:** Unulita EUR 115,00, dulita EUR 63,00. Adreso: Liivalaia 33, 10118 Tallinn, Estonio; ☎+372 631 5333.





## **P4** Sankt-Peterburgo

*30.07 – 03.08, trajne, 5 tagoj/4 noktoj*

---

30.07 Vespere transporto de Reval Hotel al la Fervoja Stacidomo kaj forveturo per trajno al Sankt-Peterburgo (700 km).
31.07 Matene alveno al Sankt-Peterburgo. Vizito de urbaj vidindaĵoj, inter ili placoj, palacoj kaj muzeoj, kaj konatiĝo kun la historio de la Romanov-oj. Enhoteliĝo kaj vespermanĝo en la hotelo.
01.08 Vizito al Ermitaĝo matene kaj perŝipa ekskurso laŭ riveroj kaj kanaloj posttagmeze. Vespermanĝo en la hotelo.
02.08 Vizito al parko kaj palaco en Puŝkin. Lunĉo. Posttagmeze libera tempo. Fruvespere forveturo al Vilno (per trajno).
03.08 Matene alveno al Vilno, transporto al Reval Hotel kaj fino de la servoj.

*Avertoj: Partoprenantoj devas mem akiri vizon por Rusio!*
*Oni vojaĝas en kvarpersona kupeo kun lito (sendepende ĉu estis mendita unu- aŭ dulita ĉambro)!*
*Ne estas inkluzivigita matenmanĝo en la trajno. Eblas aĉeti la matenmanĝon dum la trajnvojaĝo.*

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 755 EUR, dulita 615 EUR.

**P1 + P2 + P4 Ekstraj noktoj en Reval Hotel Lietuva (4★) en Vilno:** Unupersona 102 EUR, dulita 63 EUR. Adreso: Konstitucijos pr. 20, Vilnius, Litovio; ☎+370 5 272 62 00.

# Dumkongresaj ekskursoj

**Kiel mendi ekskursojn?**
Bonvolu atente tralegi la priskribojn kaj elekti. Post la elekto, plenigu klare kaj atente (preslitere) la koncernan parton de la mendilo, kaj sendu ĝin samtempe kun via pago al Roterdamo (litovoj al la litova peranto). Se en via lando estas kongresa peranto, vian mendon kaj pagon vi povas sendi al tiu. Por malmendoj validas la kondiĉoj presitaj dorsflanke sur la mendilo. Bv. ĉiam sendi la mendilon kaj pagon al la sama adreso, t.e. instanco.

**Ĝeneralaj kondiĉoj**
Ĉar ĉiuj ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizanto rezervas al si la rajton eventuale nuligi iujn ekskursojn, pri kio ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, kun propono de eblaj alternativoj.

Ĉi-kongrese, pro lokaj cirkonstancoj, la dumkongresaj ekskursoj havas limigitajn kapacitojn kiuj varias laŭ la ekskurso, ekde maksimume 40 partoprenantoj ĝis maksimume 120 partoprenantoj. En la retpaĝo de la kongreso eblos vidi kiuj ekskursoj ankoraŭ havas liberajn lokojn.

Ĉiuj ekskursoj startas de antaŭ Reval Hotel, kaj revenas tien. Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos E-lingvaj interpretistoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj. Bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo. Ili faros sian plejeblon por bone servi al vi. Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (EUR).

Kun la kongresaj dokumentoj, ĉe la aliĝo ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la menditaj ekskursaj biletoj. Sur la biletoj estos bazaj informoj pri la ekskurso (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj sur la biletoj. Ne forgesu preni ŝirmilojn kontraŭ suno kaj varmo! Bv. noti ke la tereno en kelkaj ekskursoj povas esti netaŭga por homoj kun marŝhandikapoj. La priskriboj de la ekskursoj kutime mencias tion.

**Servoj inkluzivigitaj**
– ĉiĉeronado de loka turisma servo kaj E-lingva ĉiĉerono;
– vojaĝo per altnivelaj aŭtobusoj;
– enirbiletoj de la vizitataj lokoj (krom se alie indikite); kaj
– tagmanĝo dum la tuttagaj ekskursoj (trinkaĵoj ne estas inkluzivigitaj).




# Tuttagaj ekskursoj

La tuttagaj ekskursoj okazos precipe en merkredo, la 27-a de julio, sed ankaŭ en aliaj tagoj. La prezoj inkluzivas tagmanĝon. Ĉiuj aŭtobusoj estas altkvalitaj kaj klimatizataj.

## E1 Kaunas kaj Muzeo en Rumšiškės

*Mardo kaj merkredo Ekiro: 09h00 Reveno: ĉ. 18h00 Prezo: 44 EUR*



Kaunas, la dua urbo de Litovio, havas multajn arkitekturajn monumentojn, inter kiuj estas restaĵoj de la kastelo, malnova urbodomo kromnomita La Blanka Cigno, katedralo, domo de Perkūnas, preĝejo de Vytautas k.a. Oni vizitos ankaŭ la artgalerion de M.K. Čiurlionis, fama litova pentristo kaj komponisto, Zamenhof-straton, Esperanto-domon, kaj promenos laŭ Laisvės alėja (avenuo de Libero). Lunĉo en restoracio "Berneliu, užeiga" (Taverno de fraŭloj).

Post la lunĉo veturo al Rumšiškės, kie estas etnografia Muzeo de Popola Vivmaniero. El diversaj lokoj estis transportitaj kaj rekonstruitaj vilaĝaj bienoj, kiuj prezentas la vivon de la litova popolo en la 19-a–20-a jarcentoj. Ĉi tie oni povos gustumi tradiciajn litovajn manĝaĵojn.

## E2 Veisiejai kaj Grūtas-Parko

*Lundo kaj merkredo Ekiro: 08h00 Reveno: ĉ. 18h00 Prezo: 45 EUR*

La partoprenantoj vizitos la banurbon Druskininkai, la plej grandan ripozlokon ĉe la rivero Nemunas, kiu en 1794 estis oficiale dekretita sanripozejo fare de reĝo Stanislaus, kun famaj mineralaj akvoj. Oni vizitos ankaŭ interesan muzeon "Arbara eĥo", kie feoj kaj aliaj fantaziaj arbarestaĵoj kaŝiĝas en trunkaj truoj. Poste oni veturos al la urbeto Veisiejai, kie en 1885 loĝis L. Zamenhof kaj finpreparis por eldono la Unuan Libron de Esperanto. En la urbeto estas du monumentoj dediĉitaj al la aŭtoro de la internacia lingvo, unu el ili en la loko kie estis la domo kie li vivis.




Proksime en Grūtas estas parko de sovetaj skulptaĵoj, kiuj estis kunportitaj tien en 1999 el diversaj litovaj urboj. La loko estas ĉirkaŭita per pikdratoj kaj gardoturoj, kiuj memorigas pri koncentrejo. En la parko estas eksponataj 65 bronzaj kaj granitaj skulptaĵoj de famaj komunismaj agantoj. La ekskursantoj havos lunĉon en restoracio de la parko.

## **E3** Nacia Parko de Aukŝtajtio

*Merkredo kaj vendredo    Ekiro: 08h00    Reveno: ĉ. 18h00    Prezo: 40 EUR*

---



La parko situas en la orienta parto de Litovio kaj okupas 40 000 hektarojn. Riveroj kaj riveretoj kunligas 200 lagojn. Arbaroj, plejparte koniferaj, kovras 69% da teritorio. En la parko estas 106 monumentoj de arkeologio kaj popola arkitekturo. Tie estas ankaŭ diversaj ŝtonepokaj arkeologiaj eltrovaĵoj.


La ekskursantoj vizitos Muzeon de Abelbredado (unu abelfamilio tie loĝas en skulptaĵo de Bubilas, la dio de abeloj). En la unustrata vilaĝo Ginučiai eblos vidi malnovan 200-jaran akvomuelejon. De sur monteto Ladakalnis (la pagana diino *Lada* naskis la mondon) malfermiĝas belega panoramo kun ses lagoj. En la vilaĝo Palūšė staras ligna okangula preĝejo konstruita en 1750. Palūšė estas la turisma centro de la parko; ĉi tie la ekskursantoj havos lunĉon en "Aukštaičiu, užeiga" (Taverno de aŭkŝtajtoj), restoracio de nacia stilo. Nepra ekskurso por amantoj de la naturo!

## **E4** Ĉenemunaj kasteloj

*Merkredo    Ekiro: 07h00    Reveno: ĉ. 21h00    Prezo: 49 EUR*

---

*Averto: Dum ĉi tiu ekskurso oni ofte grimpas montetojn kaj turojn!*



La unua halto estos en Kaunas, kie ĉe kunfluo de la riveroj Nemunas kaj Neris staras restaĵoj de kastelo el la 13-a jarcento. Poste en Raudondvaris oni vizitos nobelan kastelon el la 16-a jarcento. En la urbeto Vilkija, kies malnova parto estas monumento de urboplanado, la ekskursantoj vizitos etnografian muzeon. Apud Seredžius estas grandbieno Belvederis (bela vidaĵo), kie grimpinte 365 ŝtupojn oni povas ĝui belegan panoramon de la rivero Nemunas.


Veliuona estas unu el la plej antikvaj loĝejoj de la regiono; la kastelo Junigenda estis menciita en 1291, kiam Krucistoj ĉi tie unuan fojon ekuzis pulvoeksplodajn armilojn. Laŭ legendo ĉi tie pereis grandduko Gediminas kaj unu monteto nomiĝas Tombo de Gediminas.

En Raudonė estas kastelo de nobela bieno el la 16-a jarcento. Turo 35 metrojn alta por spekti la ĉirkaŭaĵojn estas malfermita al la vizitantoj. Post vizito de la kastelo la ekskursantoj venos por lunĉo en boaton, kaj navigante unu horon povos ĝui la bordojn de Nemunas.

Post vizito al Panemunė, tipa feŭdula kastelo el la 17-a jarcento ĉirkaŭita de parko kaj kaskadaj lagetoj oni revenos al Vilno.

## **E5** Antikvaj ĉefurboj de Litovio

*Merkredo kaj Ĵaŭdo   Ekiro: 09h00   Reveno: ĉ. 18h00   Prezo: 41 EUR*




**Kernavė** estis antikva urbo; iuj nomas ĝin Litova Trojo. Tie elstaras kvin montetoj. La plej granda nomiĝas Kastelmonto aŭ Tronseĝo de Mindaugas. Aliaj montetoj havas nomojn: Garnizona monto, Ofer-monto, monto de ĉefpastro Lizdeika. Sude de la kastelmontoj arkeologoj trovis spurojn de granda 5-hektara setlejo, kie povis loĝi ĉ. 2000 homoj (tiutempe tio estis sufiĉe granda urbo). Kiam grandduko Mindaugas en la 13-a jarcento komencis unuigi litovajn terojn, Kernavė estis la unua ĉefurbo de Litovio. La ekskursantoj povos ĝui belajn vidaĵojn de sur la montetoj aŭ viziti muzeon de arkeologiaj trovaĵoj.

Lunĉo en tipa restoracio ĉe la rivero Neris, survoje al la alia ĉefurbo **Trakai**, kiu fariĝis la ĉefurbo de Litova Granda Duklando en la 14-a jarcento. En la regiono multas lagoj kaj sur insulo de la lago Galvė en la 15-a jarcento estis kontruita ŝtonmura kastelo, kiu post rekonstruo fariĝis unu el la plej ofte vizitataj historiaj-arkitekturaj monumentoj de Litovio. En la kastelo funkcias riĉa muzeo. Trakai famas ankoraŭ pri karaimoj, etna tjurka grupo, kiun el Krimeo ĉi tien venigis grandduko Vytautas en la 14-a jarcento. Nuntempe en Litovio loĝas ĉ. 300 karaimoj. En Trakai funkcias ilia muzeo.

## **E6** Mallarĝtraka trajno en Anykščiai

*Merkredo   Ekiro: 08h00   Reveno: ĉ. 17h00   Prezo: 55 EUR*



Ĉi tiu ekskurso promesas impresplenan veturon al Anykščiai, malgranda sed vere bela urbo. La partoprenantoj vizitos malnovan urboparton, Muzeon de Ĉevalo, Kapelon originalan konstruaĵon de moderna kaj antikva arkitekturo, la preĝejon de sankta Mateo kun la plej alta turo en Litovio (84 metrojn alta), kaj malnovan fervojan stacion, kie oni konatiĝos kun la historio de la mallarĝtraka fervojo; poste oni faros mallongan veturon per tiu teknika monumento de la 20-a jarcento. Post duonhoro oni elvagoniĝos en Žažumbris ĉe giganta 300-jara kverko, kies maksimuma dikeco estas 5,4 m. Ĉi tie en arbaro okazos piknik-stila lunĉo.

# Duontagaj ekskursoj

## D1 Malnova Vilno

*Tagoj: sabato, dimanĉo kaj ĵaŭdo posttagmeze (14h00-18h00), mardo matene (09h00-13h00)* *Prezo: 21 EUR*

---

Vilno, ĉefurbo de Litovio. Grandduko Gediminas en 1323 invitis negocistojn kaj metiistojn el diversaj eŭropaj landoj por evoluigi la lokajn konstruaĵojn kaj manlaborojn. Tiu jaro estas konsiderata kiel fondojaro de la urbo. La malnova urboparto estas la plej granda en Orienta Eŭropo kaj okupas 359 hektarojn kun ĉ. 1500 konstruaĵoj. Unesko enskribis ĝin en la liston de Monda Kultura Heredaĵo, interalie ĉar tie kunplektiĝas diversaj epokoj kaj stiloj. Preĝejoj de sankta Anna, de sanktaj Petro kaj Paŭlo estas vere ĉarmaj arkitekturaj majstroverkoj. Oni vizitos kortojn de la universitato, unu el la plej malnovaj en Orient-Eŭropo, fondita en 1579, kaj de sur kastelmonto de Gediminas ĝuos panoramon de la urbo.

Aldonaj muzeoj por konatiĝo kun Vilno kaj la historio de Litovio, *ne inkluzivitaj en la prezo de la ekskurso:* Muzeo de Viktimoj de Genocido (Muzeo de KGB), 1 EUR; Ekspozicio "Kristanismo en litova arto", 4 EUR; Nacia Muzeo de Litovio (historio de pratempo ĝis la 20-a jarcento), 2 EUR; Vilna Bildgalerio, 3 EUR.



## **D2** Retrorigarde: Litovio sub soveta reĝimo

*Tagoj: mardo posttagmeze (14h00-18h00) kaj vendredo matene (09h00-13h00)* *Prezo: 22 EUR*

---

Vilno malfermiĝis al la mondo post la rekreo de sendependeco en 1990. Kia ĝi aspektas nun? Kompreneble ĝi ne estas tiel riĉa kiel aliaj eŭropaj ĉefurboj, tamen spite perdojn kaj malfacilajn tempojn, Vilno kreskas kaj plibeliĝas. Por ekkoni la litovan ĉefurbon pli bone, dum la ekskurso oni ekvidos plej gravajn lokojn, kiuj iel ligiĝas al la soveta reĝimepoko: la Domon de Signaturintoj, Palacon de Ŝtatprezidento, Muzeon de Genocido (konstruaĵo de estinta KGB), Parlamentejon, Televidan Turon kaj Tombejon de Antakalnis.

## **D3** Vilna universitato kaj ĝia biblioteko

*Tagoj: lundo kaj ĵaŭdo matene (09h00-13h00)* *Prezo: 23 EUR*

---

La universitato okupas tutan kvartalon en la malnova urboparto. La konstruaĵoj formas labirinton de 13 fermitaj kortoj kun pordegoj, galerioj, malnova astronomia observatorio, kaj memorigaj tabuloj pri famaj profesoroj. Ili respegulas diversajn stilojn: gotikan, renesancan, barokan kaj klasikan. Unu el la plej belaj partoj de la universitato estas la preĝejo de sankta Johano kaj ĝia sonorilturo.

La vilna universitato, fondita en 1579, estas unu el la plej malnovaj en Orienta Eŭropo. Ĝia biblioteko, fondita en 1570, posedas 6 milionojn da libroj, dokumentoj kaj manuskriptoj. La ekskursantoj havos eblecon rigardi unikan kolekton de inkunabloj kaj malnovaj mapoj.

## **D4** Kastelo en Trakai

*Tagoj: sabato, dimanĉo, lundo kaj mardo posttagmeze (14h00-18h00), ĵaŭdo matene (09h00-13h00)* *Prezo: 22 EUR*

---

Trakai, la estinta ĉefurbo de la Litova Granda Duklando, situas 27 km okcidente de Vilno. Ĝia kastelo, konstruita sur insulo meze de la lago Galvė, estas la plej ofte vizitata kaj fotata kastelo de Litovio. La kvinetaĝa fortikaĵo el ruĝaj brikoj estis konstruita de grandduko Vytautas en la dua duono de la 14-a jarcento. Samtempe li invitis al Trakai tatarojn el Krimeo kaj loĝigis ilin apud la kastelo. En la kastelo funkcias riĉa muzeo.



## **D5** Eŭropa centro kaj parko

*Tagoj: dimanĉo, ĵaŭdo kaj vendredo posttagmeze (14h00-18h00), mardo matene (09h00-13h00)* *Prezo: 21 EUR*

La geografia centro de Eŭropo estas 25 km norde de Vilno. Tion en 1989 difinis Franca Nacia Geografia Instituto. 19 km pli norde de la centro sub la ĉielo estas aranĝita ekspozicio de skulptaĵoj. La ekspozicio okupas 55 hektarojn kaj prezentas pli ol 90 skulptaĵojn, kreitajn de artistoj el 27 landoj inkluzive Brition, Finnlandon, Germanion, Japanion, Litovion, Nederlandon, Peruon kaj Usonon.

# Semajna skemo de ekskursoj

T = tuttaga ekskurso (diversaj hordaŭroj); M = duontaga ekskurso matene (09h00-13h00); P = duontaga ekskurso posttagmeze (14h00-18h00)

| | sab 23/07 | dim 24/07 | lun 25/07 | mar 26/07 | mer 27/07 | ĵaŭ 28/07 | ven 29/07 | Prezo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 | | | | T | T | | | 44 EUR |
| E2 | | | T | | T | | | 45 EUR |
| E3 | | | | | T | | T | 40 EUR |
| E4 | | | | | T | | | 49 EUR |
| E5 | | | | | T | T | | 41 EUR |
| E6 | | | | | T | | | 55 EUR |
| D1 | P | P | | M | | P | | 21 EUR |
| D2 | | | | P | | | M | 22 EUR |
| D3 | | | M | | | M | | 23 EUR |
| D4 | P | P | P | P | | M | | 22 EUR |
| D5 | | P | | M | | P | P | 21 EUR |

# Bankedo

La bankedo okazos en lundo, de la 19h00 ĝis la 20h30, en la bankeda salono de hotelo Le Méridien Villon, kiu estas ĉ. 20 km for de Vilno, inter lagoj kaj belega naturo. Dum la manĝo la ensemblo Skrabalai ludos naciajn muzikaĵojn. Estas inkluzivigita la transporto de Reval Hotel al Le Méridien Villon kaj reen.

*Bv. atenti pri la horoj de transportoj, kiuj estos indikitaj sur la bankedaj biletoj!*



**Menuo**

*Verda salato kun fumaĵita salmo,*
*sezama bastoneto & ananasa saŭco*
*Vegetara supo kun ruĝa vino*
*Pektena bovidaĵo kun forstista saŭco,*
*terpoma fritbulo & sortimento de vegetaĵoj*
*Ĉokolada torto Schwartzwald kun freŝaj fruktoj*

**Vegetara menuo**

*Fritita toŭfuo kaj verdfazeola salato kun arakidoj kaj askalonoj*
*Vegetara supo kun ruĝa vino*
*Mocarelaj pecoj kaj avokado en foliigita pasto*
*kun tomata saŭco kaj legomraguo*
*Ĉokolada torto Schwartzwald kun freŝaj fruktoj*

**Trinkaĵoj**

*2 x 15cl glasoj da vino (hispana) aŭ 0,5 l da biero*
*Sukoj*
*Senalkoholaj gas-trinkaĵoj*
*Minerala akvo*
*Kafo aŭ teo*

**Prezo:** 55 EUR

# Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

**Sabato, 23 julio**. Malfermo de la kongresejo je la 09h00. Alveno de kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Loĝigo. Komitato de UEA. Unuafojaj kongresanoj (18h00). Artistoj. Libroservo. Interkona Vespero (20h00). Giĉetoj funkcias ĝis la 18h00.

**Dimanĉo, 24 julio**. Solena Inaŭguro (10h00). Ekumena Diservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Kongresa Temo. Litova Eksprese. Libroservo. Nacia Vespero.

**Lundo, 25 julio**. Kleriga Lundo. ILEI. Cseh-kurso kaj seminario. Paroligaj kursoj. Litova Eksprese. Ekzamenoj (registriĝo kaj antaŭtesto). Strategia Forumo. Libroservo. Bankedo. Balo.

**Mardo, 26 julio**. Tago de la Lernejo. IKU. Kongresa Temo. Paroligaj kursoj. Litova Ekseprese. IKEL. Ekzamenoj (skribaj). Estraro Respondas. Landa Agado. IKEF. Delegita Reto. Libroservo. Teatro.

**Merkredo, 27 julio**. Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

**Ĵaŭdo, 28 julio**. Tago de la Libro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Cseh-kurso kaj seminario. Paroligaj kursoj. Ekzamenoj (parolaj). Litova Ekseprese. CO Respondas. Urbestra Akcepto (por invititoj). Libroservo. Koncerto.

**Vendredo, 29 julio**. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. Cseh-kurso kaj seminario. Paroligaj kursoj. Terminologia Forumo. Aŭkcio. Ĉefdelegitoj kaj Perantoj. Venontaj UK-oj. Libroservo. Internacia Arta Vespero.

**Sabato, 30 julio.** Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).

# Programeroj dum UK

**Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA.** Dum la UK okazos la Internaciaj Ekzamenoj pri Esperanto je elementa kaj meza niveloj. La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika antaŭtesto, skriba parto kaj parola parto. Nur sukcesintoj en la gramatika antaŭtesto rajtas partopreni la skriban parton de la ekzameno kaj, atinginte en tiu skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj, la parolan parton. Pro praktikaj kialoj maksimume 24 kandidatoj povos ekzameniĝi. Pro tio, anticipa sinanonco estas konsilinda. Anoncu vin, prefere antaŭ la 15-a de junio 2005, ĉe la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), P.O. Box 36, Powhatan VA 23139, Usono,

☎+1 804 598 3050, 🖷+1 804 598 5608, 🖳bmaxey@visi.net, kaj samtempe pagu la speciale favoran ekzamenkotizon (40% de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato) al UEA-konto ilek-a. Kaze de neprezentiĝo aŭ nesukceso en la antaŭtesto, oni rericevos 50% de la pagita kotizo. Se la maksimuma nombro de ekzamenotoj ne jam estos atingita, eblos sin anonci surloke, ĉe la ILEI-budo en dimanĉo. Tiam la ekzamenkotizo estos 60% de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato. Oni aparte atentigas UEA-delegitojn pri la rekomendo de la Estraro de UEA, ke la delegitoj "atingu almenaŭ la nivelon de la meza ekzameno". Simile, laŭ la regularo pri la nova ILEI/UEA-ekzameno pri instrukapablo, "kandidatoj devas posedi Esperanton minimume ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA". Detalajn informojn pri la ekzamenoj, inkluzive de specimenaj testoj, oni trovas en la Gvidilo al Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA (2-a eld., elĉerpita). Bazaj informoj pri la ekzamenoj kaj specimenaj testoj troviĝas ankaŭ ĉe 🌐http://www.edukado.net/ekzilei.jsp.

**Lingvoekzercado kun edukado.net.** Post la granda sukceso atingita dum la Pekina UK, edukado.net denove gvidos paroligajn kursojn por la partoprenantoj de la UK. La du paralelaj kursoj – kiuj okazos en kvar tagoj dum la semajno, entute 8 fojojn – estas celitaj por komencantoj kaj meznivelaj parolantoj de la internacia lingvo. La programojn gvidos la konataj Esperanto-pedagogoj s-ino **Katalin Kováts** kaj s-ro **Sylvain Lelarge.**

**Cseh-kurso kaj Cseh-seminario**: "Zamenhof kreis la lingvon kaj Cseh la metodon por instrui ĝin", oni kutime diras en Esperantio. Jen, do, ŝanco konatiĝi kun la fama metodo iniciatita de Andreo Cseh kaj uzita de elstaraj instruistoj de nia E-historio kiel Hendrik Seppik, Julio Baghy, Sigismundo Pragano, Lidja Zamenhof ktp. La kurso estas destinita al komencantoj, kaj la seminario al instruistoj kiuj deziras lerni la metodon aŭ akiri ateston pri ĝi. La seminarianoj devas havi la libron *Baza Cseh-Kurso* (EUR 10,80; aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA) kaj ankaŭ observi la kurson. La partopreno en ambaŭ aranĝoj estas aparte pagenda. La kotizo por la kurso kaj la seminario estas EUR 50,00 por enloĝantoj en landoj de A-kategorio, por B-landanoj EUR 37,50. La kotizo por la seminario inkluzivas la observadon de la kurso. Detalaj informoj kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la organizantoj: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; 🖳iei001@tiscali.nl.

**Litova Ekspreso.** Dum tri lecionoj vi ricevos bazajn informojn pri la litova lingvo de Vera Valentaite, magistrino pri litova filologio, kun dek jaroj da sperto pri instruado.

# Kiu kongresos kiam kaj kie?

**61-a Internacia Junulara Kongreso** (**IJK**), en urbo Zakopane (Pollando), 31 julio – 7 aŭgusto 2005. Aliĝoj kaj informoj ĉe TEJO/IJK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 10 436 1044, 🖷+31 10 436 1751; 🖳oficejo@tejo.org. Vizitu ankaŭ la TTT-ejon: http://www.tejo.org/ijk/2005/cxefa.php.

**38-a ILEI-Konferenco.** La 38-a ILEI-Konferenco okazos de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2005 en Kaunas, kun la temo "Interkultura komunikado en edukado". La konferenco sesios en la Universitato Vitautas la Granda. Estas diversnivelaj tranokteblecoj en la ĉirkaŭaĵo de la universitato, situanta en la urbocentro mem de Kaunas. La kotizo varias inter EUR 24,00 kaj EUR 88,00 depende de la kategorio kaj loĝlando de la aliĝinto. Kadre de la konferenco estos diskutataj diversaj aspektoj de la interkultura komunikado, okazos lingva festivalo kaj, interalie, sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA. Informoj pri la konferenco kaj aliĝilo estas havebla ĉe la ILEI-sekretario Atilio Orelana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; 🖳iei001@tiscali.nl.



**36-a Internacia Infana Kongreseto** (**IIK**), apud Vilno, 23-30 julio 2005. Denove ni invitas infanojn inter 6- kaj 13-jaraj kun bona rego de Esperanto al neforgesebla semajno. La IIK okazos apud lago en arbaro, 36 kilometrojn nordoriente de Vilno. Dormlokoj estas en 5-6 apudaj dometoj kun ĝis 8 dormlokoj por ĉambro. Ĉiu dometo havas duŝejojn kaj necesejojn. Ni havos ekskluzivan uzon de la ripozejo, do ni povos krei unikan Esperantan etoson. En la ripozejo troveblas infana ludejo, sporta tereno por i.a. korbopilko, retpilko kaj futbalo. Apude estas lago kun observanto por kontroli la sekurecon de la naĝantoj. Ĉe la lago eblas uzi boatojn kaj akvobiciklojn. Estas eksterdomaj tabloj kaj seĝoj, kaj subĉiela rostejo, ekzemple por baki ŝaslikojn kaj similaĵojn. Pliaj informoj kaj aliĝiloj troveblas en la retpaĝo de la UK kaj ĉe la komisiito pri IIK, s-ro Stefan MacGill, Pannonia u. 30/I/6, HU-1136 Budapest, Hungario; +36 1 349-5207; 🖳stefan.macgill@galamb.net kaj s_macgill@yahoo.co.nz.

# Ĝeneralaj informoj

**Disdonado de propagandiloj kaj informiloj.** Universala Kongreso estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri iu nova iniciato, pri specialaj agadoj de via faka asocio, por reklami novan eldonaĵon aŭ revuon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, por anonci iun renkontiĝon, kursaron, varon. La plej efika maniero estas enmeti la informilon en dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo estas aparte pagenda (275 eŭroj), kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA por disdonado. Neniu dokumento rajtas esti distribuata en la kongresejo sen permeso de la Estraro.

**Salonmendoj kaj standoj (budoj).** Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevis mendilon por havi salonon por sia kunveno dum la UK, se ili tion bezonas. Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 15-a de marto de la kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj. Se via asocio ankoraŭ ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj kiuj volas aparte efike informi kongresanojn, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon dum la kongreso (320 eŭroj). Tiujn budojn oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.) sed jes por kolekti mendojn.

**Kongresa Libroservo.** Universala Kongreso estas okazo ankaŭ por aktualigi vian bibliotekon, aĉetante en la plej riĉa E-vendejo de la jaro: La Kongresa Libroservo. Multaj novaj libroj, interalie el la kongreslando mem, estos unuafoje lanĉitaj en la Kongresa Libroservo, en kiu plurajn titolojn eblos aĉeti ankaŭ kun speciala rabato. *La Kongresa Libroservo havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK*. Se vi aŭ via asocio volas vendigi viajn eldonaĵojn, necesas ke vi ofertu ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la Kongreso.

**Pagmanieroj.** Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi la plej oportuna kaj plej malkara. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas poŝta aŭ banka monĝiro. Se vi mendas proksime al la limdatoj, bv. ankaŭ noti ke pagoj al poŝtaj kontoj ekster Nederlando (Germanio, Svedio k.s.) povas foje daŭri eĉ unu monaton. Nepre konsideru malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bonvolu ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco. Kotizojn kaj donacojn al la bonfaraj kasoj oni prefere pagu al la landa peranto (vidu la liston de la oficialaj perantoj sur la interna dorskovrilo).

Pagojn por loĝigo, ekskursoj, bankedo kaj flugbileto faru rekte al Universala Kongreso de Esperanto en unu el la jenaj manieroj:

– poŝta ĝirkonto: nederlanda konto 62 73 37 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam. IBAN-numero: NL38PSTB0000627337, SWIFT (BIC)-kodo: PSTBNL21.

– banko: per banka ĝiro al konto 42.69.01.444 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto ĉe ABN-AmRo Bank, Rotterdam. IBAN-numero: NL86ABNA0426901444. SWIFT (BIC)-kodo: ABNANL2A.

– poŝtmandatoj: sendu internacian aŭ nederlandan poŝtmandaton rekte al la konstanta adreso.

– UEA-konto: personoj kun sufiĉa bonhavo ĉe UEA povas sendi mendilojn kaj peti debeton al sia persona konto.

- monbiletoj: oni povas sendi monbiletojn (en eŭroj aŭ valuto ŝanĝebla al eŭroj) al la konstanta adreso, prefere en registrita koverto.

– al la poŝtokonto en la nomo de Universala Esperanto-Asocio en Belgio: 000-1631831-97 / Germanio: Köln 3182.91.509 BLZ 370 100 50 / Svedio: 74374-0 / Svislando: Bulle 12-2310-0.

Se vi pagos per banka ĉeko, sendu ĝin al la konstanta adreso (sube, p. 32). La ĉeko estu en eŭroj. Pagante per banka ĝiro aŭ ĉeko de ekster Nederlando, nepre aldonu 9,50 eŭrojn por la bankkostoj. Prefere ne sendu ĉekojn kiuj ne estas titolitaj al unu el la bankoj en Nederlando. Kostoj por ili povas esti tre altaj. Ne forgesu ĉiam klare indiki la celon de via pago. Loĝantoj de la kongresa lando sendu mendilojn kaj pagojn al la kasisto de LKK.

*N.B.* UEA havas ankaŭ aliajn bankkontojn, je dispono de la Asocio, do ne de la Kongresa Administracio (vd. Jarlibron 2004, p. 38-39). Prefere *ne* sendu kongrescelajn pagojn al tiuj kontoj, ĉar la traktado povas daŭri pli longe.

**Kreditkartoj.** Eblas pagi ankaŭ per kreditkartoj Visa, Eurocard, Mastercard, Access kaj American Express, indikante la numeron de la karto, la daton ĝis kiu ĝi validas, kaj la 3 kontrolciferojn malantaŭe sur la karto (CVC-numero). En tiu kazo la pagata sumo tamen devas esti plialtigita per 5% pro administraj kostoj, tiel ke por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagmanieron.

**PayPal.** Eblas uzi PayPal por pagi la kongresajn mendojn. Estas 5%-a administra aldonkosto, same kiel rilate kreditkartajn pagojn.

**Asekuro.** La kongreskotizo ne inkluzivas asekuron kontraŭ akcidento aŭ malsano de aliĝinto dum la kongreso. Necesas do, ke ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga asekuro. La Kongreso mem ne repagas mendojn (ekz. por loĝado, ekskursoj, bankedo), se la malmendo venas post la difinita limdato. Ĉar temas pri relative grandaj monsumoj, estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno. Pri tio konsultu vian kutiman asekuriston.

**Donacoj.** La kongreso bonvenigas donacojn por la ĉi-subaj celoj:

– *Adoptaj Gepatroj:* subvencias partoprenon en la Internacia Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– *Fondaĵo Canuto:* helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– *Triamonda Kaso:* helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.
– *Blindula Kaso:* helpas al blindaj kongresanoj.
– *Volontula Fondaĵo:* subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.
– *Ĝenerala Kaso:* por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

# Kontaktinformoj

**Centra Oficejo de UEA, Kongresa Administracio:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 (0)10 436 1044, 🖷+31 (0)10 436 1751; 🖳kongresoj@co.uea.org. *N.B.* Pri ĉiuj aferoj bv. korespondi nur kun la CO kaj neniam skribi al LKK. LKK-anoj ne povas trakti individuajn petojn kaj leterojn kaj ne respondos ilin. **Retpaĝoj:** http://www.uea.org/kongresoj.

# Kongresaj perantoj

Se estas en via lando, prefere sendu viajn mendilon kaj pagon al la peranto. Se ne, sendu la mendilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg
**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto House, 143 Lawson St, 2016 Redfern NSW
**Belgio:** Marcel Delforge, Rue des Glacières 16, 6001 Charleroi-Marcinelle *aŭ* Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
**Britio:** Esperanto-Asocio de Britio (EAB), Station Rd, Barlaston, ST12 9DE Stoke-on-Trent
**Ĉeĥio:** KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice
**Danio:** Bent Wiinberg, Naeldebjerg Alle 30, 2670 Greve
**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, 93812 Kuressaare
**Finnlando:** Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula
**Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris
**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
**Hispanio:** S-ro Pedro A. Garrote Escribano, CL Don Sancho 17-4º-LL, 47002 Valladolid *aŭ* Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell
**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest
**Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 101 Reykjavík
**Israelo:** Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin
**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano
**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162 Tokyo
**Kanado:** Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5
**Korea Resp.:** Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul, 121-703
**Kroatio:** Josip Pleadin, Grkinska 1, 48350 Djurdjevac
**Latvio:** Alīda Zigmunde, "Daugavieši", Katlakalns, Rīgas raj, 2111
**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 3000 Kaunas C
**Nederlando:** Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam
**Norvegio:** Agnar Fitjar, 5281 Valestrandsfossen
**Nov-Zelando:** David Dewar, 4 Harlech Mews Avonhead, 8004 Christchurch
**Pollando:** Jan Książek, ul. Paderewskiego 6 m 2, 97-300, Piotrków Tryb *aŭ* Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345, Bydgoszcz
**Rusio:** Miĥail Ĉertilov, P.f. 21, 143000 Moskva-Odincovo-6 *aŭ* Halina Gorecka, ab. ja. 1248, 236039 Kaliningrad
**Serbio kaj Montenegro:** Milica Ristić-Dokmanović, Bul. Oslobodjenja 29/II, 11000 Beograd
**Slovakio:** Milan Neubeler, Popradskej brigády 14, 058 01 Poprad
**Svedio:** Lisbet Andréasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby
**Svislando:** François Randin, Vallombreuse 14, 1004 Lausanne
**Usono:** Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530




**Lietuvos avialinijos** **Lithuanian Airlines**

Ĉiam proksime al vi

Konstitucijos av. 12, Vilno
Tel.: +370 (5) 2752585, +370 (5) 2752588
Fakso: +370 (5) 2724852
Rete: bpc@lal.lt, www.lal.lt